[noto] fonto: "Budhana Kuriero" n-ro 27 (1966)

# *La Ĉeneroj de Kaŭzo*

## Maha-Nidana Suto (Digha Nikajo 15)

大因縁経

tradukis **Geo Yoxon**, Britio

La respektinda Anando alproksimiĝis al la Beatulo kaj diris: "Strange estas, Sinjoro, ke kvankam oni diras, ke la doktrino de la ĉeno de kaŭzo estas profunda kaj malfacile komprenebla, al mi ĝi estas verŝajne tute klara."

"Ne diru tion, Anando. Ne diru tion. La doktrino estas tre profunda kaj malfacile komprenebla. Okazis tiel ke, pro nekompreno de tiu ĉi doktrino, la homoj faras el vivado implikitan tordaĵon kaj fuŝplektitan bulon da fadenoj.

"Aananda, la kaŭzo de maljuneco, kadukiĝo kaj morto estas naskiĝo. Kio estas la kaŭzo de naskiĝo? Naskiĝo fariĝas pro la kuniĝo kaj formiĝo de tiuj elementoj kaj faktoroj de konstatebla ekzisto, kiuj estas kaŭzataj de deziro, de alkroĉiĝo.

"Tiu ĉi stato de alkroĉiĝo rezultas el soifo al vivsperto, avido, tiu instinkta sopiro al sinesprimo kiu aperas en ĉiu estaĵo kiel la volo al memkonservado.

"La kaŭzo de tiu ĉi soifo estas sentado, aŭ la kapablo kaj povo ricevi impresojn; impresoj kiuj, estante intime ligataj kun la funkcioj de la ses sentorganoj, estiĝas rezulte de intertuŝo kaj kontakto. Tiu ĉi kontakto estas tiu, kiu nature evidentiĝas kiel la interrilato inter unu objekto kaj alia.

"Tiu ĉi interrilato, kiel tiu de subjekto kaj objekto, estas ankaŭ rezulto de tiu kontakto; kaj, kiel psikokorpeco, tio estas la konstato de aparteco kaj de esto individua, ĝi rezultas el la persona konscio. Tiu ĉi persona konscio, Anando, estas ĉirkaŭvolvita de, kaj kaŭzita de la rekono de la ideo de subjekto kaj objekto, de la psikokorpeco siavice.

"Tiel okazas, do, Anando, ke tiu ĉi persona konscio kaŭzas ideon de aparteco, la konon de subjekto kaj objekto; tio, siavice, kaŭzas kontakton, intertuŝadon kaj interrilaton inter objektoj; tio ĉi kaŭzas sentojn, impresojn kaj la rekonon de sentimpresoj; tio produktas deziron por ankoraŭ plimultaj kaj pliintensaj sensimpresoj; tiu ĉi soifo kaŭzas alkroĉon al ekzisto en konkreta sentanta formo, la avido al fenomena vivado; tiu ĉi avido kreas la elementojn de fariĝo, kiuj fruktas en naskiĝo; kaj de naskiĝo sekvas maljuniĝo, kadukiĝo, malĝojo, sufero kaj morto, kaj la estiĝo de la tuto de malbono.

"Mi jam diris ke naskiĝo estas la kaŭzo de maljuniĝo, malĝojo kaj morto. Tio estu komprenita tiumaniere: se tute ne okazis naskiĝo iaspeca, en iu ajn medio, Anando, ĉu okazus maljuniĝo, kadukiĝo kaj morto?"

"Nepre ne, Sinjoro."

"Simile, ĉar la elementoj de fariĝo kaŭzas naskiĝon, tiel avido, la alkroĉado al ekzisto, kaŭzas la elementojn kaj faktorojn de fariĝo kaj la soifo por sensimpresoj kaŭzas fenomenan vivadon, sentojn kaj sensaciojn, kiuj estas la kaŭzo de la volo memkonservadi; se tute ne okazis sento, Anando, ĉu okazus tiu ĉi avido?"

“Nepre ne, Sinjoro.”

“Tial, tiu ĉi avido, tiu ĉi volo memkonservadi, estiĝas pro sentado kaj la soifo por sensimpresoj. Avido produktas prenemon, la ĉasadon de objektoj dezirataj. De prenemo sekvas gajno, la alkroĉiĝo al objektoj dezirataj, akiraĵoj. Tiam sekvas demandoj kaj la neceso fari decidojn pri kion fari kun la akiraĵoj, kaj el tio rezultas elektemo, volo kaj pasio. Tiam sekvas avaro, suspekto, kontraŭdiroj, kvereloj, batoj, mensogoj, kaj multaj malbonaj kaj malvirtaj aferoj pro la gardado de la posedaĵoj. Se tute ne estis iuj ajn posedaĵoj, apartenantaj persone al iu ajn, Anando, ĉu estus ia signo de avareco?”

“Ne, Sinjoro.”

“Do, Anando, oni povas vidi, ke tiuj ĉi malbonaj aferoj kaj kaŭzoj de sufero estiĝas en la mondo pro avido, pro la volo havi, pro la deziro ekpreni kaj posedi; kaj, se tute ne estis iu avido, ĉu estus ia prenemo, alkroĉiĝo kaj rezultanta malbono?”

“Nepre ne, Sinjoro.”

“Tial, Anando, tiuj ĉi du aspektoj de avido fariĝas unuo, pere de la ligilo sento kiu kaŭzas ilin. Mi jam diris, ke kontakto kaj la intertuŝo inter objektoj estas la kaŭzo por la estiĝo de sento, ĉar se ne estus kontakto aŭ intertuŝo ne rezultus sento aŭ sensacio. Simile psikokorpeco kiel subjekto kaj objekto produktas kontakton. Nu, diru Anando, se ne estus ecoj, kvalitoj aŭ karakterizaĵoj kiuj signis la kontroleblecon de subjekta psiko, ĉu estus iu indiko de objekta korpo?“

“Ne, Sinjoro.”

“Tiel same, se ne estus trajto, karakterizaĵo aŭ eco, kiu signis la ekziston de objekta formo aŭ korpo, signo de subjekta psiko aŭ spirito tute ne sin manifestus. Kaj se tiuj ĉi trajtoj kaj karakterizaj signoj ne sin manifestus, ne estiĝus kontakto aŭ interrilato. Nu, mi jam diris, ke la persona konscio estas la kaŭzo de psikokorpeco, ĉar, se la persona konscio ne sin manifestus kaj funkcius la distingiĝo inter subjekto kaj objekto ne povus ekzisti. Alifianke mi ankaŭ jam diris, ke tiu ĉi persona konscio estas la rezulto de psikokorpeco, ĉar ĝi funkcias per, kaj estas ĉirkaŭvolvita de la interrilato inter objektoj, kaj tial, en unu senco, rezultas de tiu ĉi rilato inter subjekto kaj objekto, tio estas, inter la subjekta psiko kaj la objekta formo. Do, se tiuj ĉi interrilatoj, tiuj ĉi distingiĝoj ne okazus, Anando, ne okazus tiu ĉi tuto de malbono. Kaj tiel ni alvenas al la demando pri la egoo.”

“Pri la egoo, Anando, kiuj estas la ĝenerale akceptataj opinioj? Aŭ la egoo havas formon kaj ĝi estas ligita al formo, kun formaj limoj, aŭ ĝi estas senforma kaj sen limigoj. Kiu ajn rigardas la egoon laŭ unu aŭ la alia el tiuj ĉi vidpunktoj, tion faras en rilato al sia nuna vivo aŭ sia vivo estonta, kaj lia procedo estas fantazii ĝin laŭ la propra volo. En tiu kazo, Anando, ni povas flankenlasi tiajn ideojn je la momento.”

”Tamen, estas tiuj, kiuj rigardas la egoon kiel konsistanta el sentado. Sentoj estas divideblaj proksimume en tri specojn, nome: agrablajn, malagrablajn kaj indiferentajn. El kiu speco oni supozu, ke la egoo konsistas? Se el la agrabla speco, kie estas la egoo kiam estiĝas dolora sensacio, aŭ indiferenta? Aŭ, se la feliĉa sensacio ĉesas, ĉu tiam la egoo estas forpasinta aŭ ŝanĝinta? Se la egoo estas ŝanĝinta eĉ tiuj, kiuj rigardas la egoon kiel forma aŭ senforma kaj fantazias ĝin laŭ la personaj deziroj, ne povas postulati por ĝi eternecon. Tial, Anando, el tio konkludiĝas ke ni ne povas rigardi la egoon kiel konsistanta el, aŭ posedanta senton. Sed, Anando, kie ne estas sento, ĉu tie povas esti konstato ‘Mi estas’ ?”

“Tiel oni ne povas diri, ke la egoo ne posedas senton. Nu, kiam frato ĉesas rigardi la egoon kiel aŭ konsistanta el, aŭ posedanta senton kaj ankaŭ jam ne rigardas la agoon kiel

sensenta -- efektive, kiam li rifuzas koncerniĝi en disputoj kaj opinioj, vivas sen alkroĉiĝo kaj sen avido al io ajn, li tiam povas forpeli timon kaj atingi pacon. Tiam li scias, ke li vivas laŭ la sankta vivo, ke li jam faris tion, kio estas farenda, ke post la nuna vivo neniam plu ekzistas por li kaŭzo renaskiĝi. Konsideri pri tia frato, ke li aŭ vivas aŭ ne vivas post la morto, estas absurde. Kial, Anando? Ĉar neniu ajn pervorta argumento aŭ maniero de esprimo, neniu ajn metodo por klarigi aŭ diskuti povas ampleksi aŭ inkluzivi la envidon de tiu frato, kiu tiel liberiĝis. Diri pri li: 'vere, tiu persono nek scias, nek komprenas', estas nur ridinde."

"Kiam frato jam scias kaj regas la statojn kaj kondiĉojn de kompreno kaj liberiĝo de la menso, kaj povas resti laŭvole ĉe iu el la ok niveloj de malligiteco, inter kiuj inkluziviĝas la kvar niveloj de ĝoja kontemplado -- tiam pri tiu frato oni povas diri, ke li ja trovis veran liberecon. Libereco pli alta aŭ pli senmanka ol ĉi tiu, ne ekzistas."